

la **Espero**

1990:5

SVENSKA

ESPERANTOTIDNINGEN

En 1991:

- *nova vortaro*
- *IJK en Karlskoga*
- *UK en Bergen*
- *multaj novaj*

*kontaktoj
kun
'orient-
anoj'*



ANONCETOJ

Ciu linio kostas 10 kr. Malplej alta kosto 50 kronoj. Anoncetoj konsistas el maksimume dek linioj. Mendu ĉe la redaktanto.

Bertil Wennergren kaj Kajsa Larsson havas novan adreson: Väster-
torpsvägen 154, 1 tr., 126 59 Häger-
sten; telefono: 08-886256.

Ni sciigas pri la naskiĝo de nia dua
filo Petter.

Leif kaj Anne Karin Norden-
storm

DONACOJ

C G Ingestedt, Vällingby 300.
Grums esperantoklubb 780,50.

Memore al Anna Eriksson: Mem-
broj Sundsvalls Esperantoförening
800.

Memore al Tiberio Morariu: Ĝigi
Harabagiu, San Francisco 120.

Klubo Cent: Olle Olsson, Lund 100.

SEF dankas pro la donacoj. Novaj
kontribuoj estas bonvenaj al Svenska
Esperantoforbundet, poŝtgiro 2012-3.
Krom mono, EsperantoCentro volonte
akceptas rabat-poŝtmarkojn.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunns-
gatan 21, 111 38 Stockholm,
tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Redaktör: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå,
tel. 0920-279 78

Sättning: Per Aarne Fritzson och Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: EsperantoCentro, Stockholm 1990

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunns-
gatan 21, 111 38 Stockholm,
tel. 08-11 74 34

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag
kl. 11 - 13 och 17.30 - 19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1990: Direktansluten medlem 125 kr. Familjemedlem
(utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 50 kr.

Enbart prenumeration: 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperanti-
sters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte
får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

SEFs styrelse

Ordförande: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga,
tel. 0589-155 31 (Nordiskt samarbete)

Vice ordförande: Märtha Andréasson, Tolsered Pl. 2265, 425 90 Hisings
Kärra, tel. 031-57 11 33 (Årskongresser, ekonomifrågor)

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,
tel. 08-712 82 91 (kansliet, massmedier)

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde,
tel. 0500-122 05 (massmedier)

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Fack 142, 579 00 Högsby,
tel. 0491-204 61 (turnéer, bibliotek)

Styrelseledamot: Bertil Andreasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby,
tel. 0415-501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping,
tel. 011-17 36 87 (intern.org.)

Suppleant: Per Aarne Fritzson, Väster-
torpsvägen 154, 126 59 Hägersten,
tel. 08-97 47 76

Suppleant: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå,
tel. 0920-279 78

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Öppettider: 1 september - 15 maj: onsdagar 10 - 11, torsdagar 17 - 18.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson.

Enhavo

- 67 Eŭropa Esperanto-Forumo
68 La insulanoj
69 SEJU
Ni bezonas helpantojn!
70 POR KOMENCANTOJ
Gastigu eksterlandanojn
Iom pri kafo
71 TRA LA MONDO:
La unua blinda esperantisto en Afriko
Libro pri persekutoj en Sovetunio
Literatura konkurso
Novaj revuoj
... kaj malnova
Broŝuro pri Bergen
Progreso en Pakistano
72 La 23-a somera kurso en Jyväskylä
73 NIA LINGVO:
La vera danĝero kontraŭ Esperanto
74 Krucvortenigmo
75 Ni funebras
Kalendaro
76 TRA LA LANDO:
La vortaro korektata
Bonvenon al Gotenburgo 3 - 5 de majo 1991
El Siberio kaj Ĉinio
Lingva seminario
Fariĝu delegito!
Gunnar Gällmo denove premiita

Prezidanto:

Eŭropa Esperanto-Forumo

Kunlaboro kaj kunordigo de la laboro estas neceso por ĉiu formo da progreso, speciale en la esperantomovado kun siaj limigitaj ekonomiaj rimedoj. Kaj kunlaboro en la lando inter ĉiuj esperanto-organizoj kaj sur ĉiuj niveloj estas same grave kiel inter landoj.

En Nordio ni komencis, antaŭ du jaroj, kunordigi niajn informojn al eksteraj grupoj.

Nun oni ankaŭ diskutas tion en Eŭropo. Ĝuste kiam mi skribas tion ĉi, meze de septembro okazas Eŭropa Esperanto-Forumo kaj la celo estas "pridiskuti aktualajn demandojn de la nuna kaj estonta kunlaborado lige kun la transformiĝoj okazantaj sur la kontinento".

Bedaŭrinde Sveda Esperanto-Federacio ne havis okazon sendi reprezentantojn tien. Sed mi petis pri la raporto de la konferenco kaj anoncis kompreneble nian intereson kunlabori.


Agadkonferenco

La 17-an kaj 18-an de novembro okazos kunlaboro en pli malgranda rondo. La SEF-estraro vokis klubprezentantojn al agadkonferenco. Ni ellaboros laborplanon por 1991/1992 kaj diskutos kiamaniere ni intensigos esperantoagadon en nia lando. Ni parolos ankaŭ pri la klubaj situacioj kaj pri kunlaboro trans klublimoj.

Mi admonas la esperantistojn en Svedio aktive kontribui per ideoj kaj proponoj por progresigi nian esperantolaboron. Klubmembroj povas partopreni diskuton pri tio en siaj kluboj kaj rektaj membroj povas turni sin rekte al SEF-estraranoj.

Pensu kaj agu!

Karin Lindquist



La insulanoj

Ĉapitro 1.

Karlsson dungigās kaj montriĝas, ke li estas ludbirdo.

Li alvenis kiel neĝera kirlovento en aprila vespero kaj portis ceramikan brandokruĉon per zonrimeno ĉirkaŭ la kolo. Klara kaj Lotten atendis lin ĉe la varfo de Dalarö, por transporti lin al la insulo per la fiŝreta boato, sed daŭris tre longe, antaŭ ol ili estis enboatigintaj. Ĉe la vendisto ili intencis aĉeti bareleton da gudro kaj ĉe la apoteko havigi hidralĝan ŝmirajon por la porko, en la poŝtofiĉejo ricevi poŝtmarkon kaj ĉe Sofia Lövsström pruntepreni la kokon kontraŭ duonfunto da fadenoj por la retoplektado, kaj laste ili alvenis al la gastejo, kie Karlsson regalis per kafo kaj kukoj. Kaj finfine ili enboatigis. Sed Karlsson volis direkti, kaj tion li ne povosciis, ĉar li neniam pli frue vidis jardvelan boaton, kaj tial li kriis, ke ili hisu la antaŭvelon, kiu ne troviĝis.

Kaj sur la dogana varfo staris pilotoj kaj gardistoj kaj priridis la manovrojn, kiam la boato ĝiris ventantaŭen kaj velis ventposte direkte al Saltsäcken.

– Atentu, estas truoj en la boato, kriis pilotlemanto tra la vento; ekŝtopu, ekŝtopu! Kaj dum Karlsson rigardis por trovi la truojn, Klara estis lin forpuŝinta kaj preninta la direktilon, kaj per la remiloj Lotten sukcesis manovri la boaton ĝustadirekten denove, tiel ke ili pasadis direkte al Aspönsund en bona rapido.

Karlsson estis malgranda, kvadrata vira el la provinco Vermlando, kun bluj okuloj kaj nazo kurba kiel hoko. Vigla, ludema kaj scivolema li estis, sed la marajn aferojn li tute ne komprenis, li estis vokita al la insulo Hemsö por respondeci pri kampoj kaj brutoj, pri kiuj neniu alia volis sin okupi, post la morto de la maljunulo Flod kaj la nuna vidvina administrado de la bieno.

Sed kiam Karlsson nun volis eldemandadi la knabinojn pri statoj kaj cirkonstancoj, li ricevis vere insulajn respondojn:

– Nu ja, pri tio mi ne scias! Nu ja, pri tio nenion mi povas diri! Nu ja, pri tio mi tute ne scias!

Per ili li nenion eksciis.

La boato plaŭdis antaŭen inter la insuloj kaj ŝeroj, dum marbirdoj klukis malantaŭ la rokoj kaj tetroj ludis en la abiaro; pasadis trans fjordojn kan interinsulajn fluojn ĝis krepuskiĝo kaj ekbrilo de la steloj. Tiam ili pasis sur la fjordegon, kie la lumturo de Huvudskär intermite ekbrilis. Kaj jen ili preterpasis faskan marstangon, jen blankan marsignon, kiu similis al fantomo, jen lumis restantaj neĝoblovaĵoj kiel linŝtofo sternita por blankiĝo, jen ekaperis el la nigra akvo montroflosiloj, kiuj skrapis kontraŭ la kilo, kiam la boato transpasis ilin; jen subite vekita mevo, fortimigita de sia marroketo, trumpetis moviĝon ĉe la marhirundoj kaj ridmevoj, kiuj faris alarmon pli ol la diablo, kaj plej fore, kie la steloj enmariĝis, estis videblaj unu ruĝa kaj unu verda okuloj de granda vaporŝipo, kiu trenis long-

an vicon da rondaj lumoj, eligitajn tra la salonaj fenestretoj.

Ĉio estis nova por Karlsson kaj li demandis pri ĉio; kaj nun li ricevis tiom da respondoj, ke li evidente sentis, ke li sin trovis sur fremda grundo.

"Li devenas el la internlando", tio signifas, laŭ la parolmaniero de la insulanoj, same kiel kamparano rilate al urbano.

Kun ŝmacoj la boato eniris markolon kaj for de la vento, oni devis malhisi la velon kaj remi. Baldaŭ venintaj en alian markolon, ili vidis lumon de dometo inter la alnoj kaj pinoj.

– Nun ni estas hejme, diris Klara kaj la boato pasis en mallarĝan golfeton, kie kanaletoj estis hakita tra la kanejoj. Kanoj kraketis kontraŭ la flankoj de la boato kaj vekis frajezokon, kiu cirkulis ĉe stangohoko.

Hundaĉo ekbojis kaj lanterno sin movis ĉe la dometo.

La boato estis alligita al la ekstremo de la varfo kaj la malŝarĝado de la varoj komenciĝis. La velo estis volvita sur la jadon, la masto elprenita kaj la stajoj volvitaj ĉirkaŭ la maston. La gudrobareleto estis rulita sur la kajon kaj la kuvetoj, kruĉoj, korboj, kunligaĵoj baldaŭ kuŝis sur la varfo.

Karlsson ĉirkaŭrigardis en la krepusko kaj vidis nur novajn kaj nekonatajn objektojn. Ekster la varfo kuŝis la fiŝbaseneto kun sia hisilo kaj longaflanke estis balustrado, kiu estis plenpendigita per montroflosiloj, fiksiloj, graploj, subakvigiloj, ŝnuregoj, hokfadenoj, hokoj kaj sur la varfotabulegoj staris haringobareloj, trogoj, tinetoj, kuvoj, pelvoj, kestoj por hokarfadenoj; ĉe la kajo situis borda budo, plena de logbirdoj por la surmara ĉasado: remburitaj molanasoj, mergoj, ojdemiaj, klanguloj, kaj sub la tegmenta pendaĵo, sur teniloj, kuŝis veloj kaj mastoj, remiloj, hokstangoj, direktilhokingoj, ĉerpiloj, glaciakiloj, lojtoklaboj. Kaj sur la bordo staris stangovicoj, sur kiuj pendis haringoretoj, grandaj kiel la plej grandaj preĝejaj fenestroj, pleŭronektoretoj kun maŝoj tiel grandaj, ke brako povis trairi, perkoretoj, novplektitaj kaj blankaj; sed rekte supren de la varfo kondukis kvazaŭ grandbiena aleo du vicoj de forkostangoj, sur kiuj pendis la retego. Kaj plej supre en la aleo venis nun la lanterno, jetante sian lumon sur la sablan padon, kiu briletis el konkoŝeloj kaj sekiĝintaj branĝoj, kaj en la retego brilis restintaj haringoskvamoj, simile al prujno en aranea reto. Sed la lanterno jetis sian lumon ankaŭ sur maljunulinan vizaĝon, kiu aspektis sekigita de blovo, kaj sur paron de amikecaj okuloj, kiuj ŝrumpiĝis ĉe la forno. Kaj antaŭ la maljunulino venis la hundaĉo, kiu povis iri same bone surtere kiel surmare.

(Eltiraĵo el la traduko de "Hemsöborna" fare de Yngve Nilsson)

Ni bezonas helpantojn!

La planado de la venontjara Internacia Junulara Kongreso, (Karlskoga la 20-an ĝis 26-a de julio 1991) progresas: La buĝeto estas fiksita, ni vizitis la estontan kongresejon kaj interkonsentis kun la lernejoj respondeculoj, la aliĝilo estas preta kaj presota, Ingemund Bengtsson volonte akceptis fariĝi alta protektanto kaj ni mendis la Popolan domon de Karlskoga por, kunlabore kun la komunumo, aranĝi malferman vesperon kun i.a. la rokgrupo Persone.

La ekonomio ankoraŭ restas komplika afero. Svedio ja estas multkostega lando. Ni petis subvenciojn de pluraj fondusoj kaj ŝtataj instancoj, sed ankoraŭ ne ricevis iliajn decidojn. Ni volonte havos pliajn konsilojn pri eblaj "monfontoj".

Ni ankaŭ bezonas kunhelpantojn kaj programajn ideojn. Programa komisiono fondiĝos kaj ni volas, por la planado, scii kiom da laboremuloj troviĝas por la kongresa sejmajno.

Bonvolu respondi la demandaron kaj sendu ĝin al:

47-a IJK, Box 4532, 102 65 Stockholm

Jes, mi volas helpi pri la IJK en Karlskoga!

Nomo: _____

Adreso: _____

Telefono: _____

Laboro dum la jaro:

Mi interesiĝas pri:

- Programa komisiono
- Kopiado, nombro po fojo ____
- Teknikaĵoj (lumo, sono, komunikado, komputiloj, diskoteko)
- Eksteraj rilatoj kaj eldonaĵoj
- Subvencioj kaj fondusoj
- Kongresa libro

Ni dankas por via helpo!

Laboro dum la IJK:

Mi povas partopreni

- La semajnon antaŭ IJK
- Dum la IJK (la 19-an ĝis 28-a de julio)

Mi interesiĝas pri:

- Akceptejo
- Kafejo
- Teknikaĵoj
- Informejo, deĵorado
- Libroservo
- Ĝenerala kunhelpado
- Kongresa gazeto, eksteraj rilatoj

Gastigu eksterlandanojn

Ĉu vi volas lerni paroli esperanton? La plej bona maniero lerni tion estas paroli kun eksterlandanoj, kaj la plej bona maniero renkonti eksterlandajn esperantistojn estas fariĝi (bli) gastiganto (vård) de Pasporta Servo.

La nomoj kaj adresoj de la gastigantoj de Pasporta Servo aperas en libreto, kiu aperas en ĉiu jaro. Vojaĝantoj (*resande*), kiuj volas renkonti esperantistojn dum siaj vojaĝoj, serĉas la nomon de gastiganto, kaj kontaktiĝas kun li aŭ ŝi por peti permeson tranokti (*övernatta*).

Diversaj gastigantoj havas diversajn kondiĉojn. Kelkaj volas

gastigi (*ta emot*) nur unu homon dum unu nokto, aliaj akceptas multajn gastojn dum monatoj. Kelkaj postulas (*kräva*) skriban aŭ telefonan peton (*förfrågan*), aliaj akceptas gastojn sen antaŭa anonco. Sed komune por ĉiuj gastigantoj estas ke ili akceptas la gastojn senkoste. Oni nur rajtas peti pagon por manĝoj.

La gastigantoj kompreneble rajtas nei viziton, se li ne ŝatus ricevi viziton dum iu tempo.

Se vi volas fariĝi gastiganto, plenigu la jenan respondilon aŭ skribu ĝin sur ordinara papero:

Lando _____ Urbo/Loĝloko _____

Familia nomo, s-ro/s-rino _____

Persona nomo _____

Adreso _____

Naskiĝjaro _____ Telefono _____

Situo de la loĝloko _____ km norde/sude/okcidente/oriente de _____

Mi ofertas senpagan gastigon al esperanto-parolantoj laŭ la jenaj kondiĉoj:

Nombro da gastoj _____ Nombro da tagoj _____

Necesas: Skriba peto / Telefona peto / Nenia antaŭa anonco

Aliaj kondiĉoj aŭ precizigoj _____

Dato _____ Subskribo _____

Sendu la respondilon al:

Pasporta Servo, Folkungagatan 126, 116 30 Stockholm.

Iom pri kafo

Etiopa legendo rakontas ke paŝtisto miris kial liaj kaproj fariĝis tiel viglaj, ke ili dormis eĉ ne dumnokte. Subite li vidis ke ili maĉas iujn grajnoj. Li gustumis la kafojn (*kaffebönor*), sed ili ne plaĉis al li. Tamen kiam li infuzis (*hälla hett vatten över*) ilin, kaj trinkis la infuzajon, la kafo plaĉis al li.

Ni ne scias ĉu la legendo estas vera aŭ ne. Tamen ni scias ke kafo venas de la regiono Kaffa en Etiopio, de kiu la grajno kaj la trinkaĵo ankaŭ ricevis sian nomon. En la 15a jarcento (*1400-talet*) kafo venis al Arabio, meze de la 18a (*1700-talet*) al Svedio. En nia lando kafo estis malpermesita trifoje: 1756-69, 1794-96 kaj 1802-1817. La unuan fojon la kialo de la malpermeso estis ke la terkulturistoj en la parlamento volis venĝi al la kafrinkantaj urbanoj, ĉar ili neis al la terkulturistoj liberan brandodestiladon (*brännvinsbränning*).

Nuntempe 80 elcentoj de la kafo venas el Sud- kaj Mezameriko, ĉefe el Brazilo kaj Kolombio, la cetero precipe el Orientafriko.

Oni povas pretigi kafon en diversaj manieroj. Bolitan kafon (*kokkaffe*) oni preparas lasante la muelitan kafon iom boli kune kun la akvo. Se oni verŝas la bolitan akvon tra kafo en filtropapero (*filter*) en kafofiltrilo (*kaffebryggare*) oni ricevas filtritan kafon (*bryggkaffe*). Nuntempe la kafaparatoj (*elektrisk kaffebryggare*) estas tre ordinaraj. El espresoaparato oni ricevas espreson (*espresso*), nigra forta kafo, kiun oni trinkas en malgranda kvanto. Ĝi estas simila al turka kafo (*turkiskt kaffe*), kiun oni povas trinki ĉirkaŭ Mediteraneo. La franca lakto-kafo (*kaffe med mjölk*) fariĝis populara ankaŭ en nia lando.

Leif Nordenstorn

La unua blinda esperantisto en Afriko

Bernard Nzaniye, kiu nun denove estas en rifuĝejo en Tabora, Tanzanio i. a. skribas:

"La unua blinda esperantisto en Afriko troviĝas en Tanzanio, precize en Tabora. Mi ĵus parolis kun li kaj informis min, ke li scipovas la svahilan kaj la anglan. Li povas skribi leterojn maŝine. Mi proponas al vi kontaktigi lin kun blinduloj en Stokholmo kaj aliaj lokoj en Svedio por praktiki esperanton laŭ ilia maniero.

Li ŝatus lernolibrojn por blinduloj se troviĝas. Li blindiĝis post unu jaro de la naskiĝo kaj nun estas patro de unu infanino. Ankaŭ lia edzino estas blinda.

Liaj nomo kaj adreso estas: Musindi Chuma, P.O. Box 316, Tabora, Tanzanio."

Libro pri persekutoj en Sovetunio

La danĝera lingvo, 500-paĝa studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto en Sovetunio, nazia Germanio kaj en aliaj landoj, kiu antaŭ kelkaj jaroj aperis en Germanio, nun aperis per sia dua eldono en Sovetio. Oni nun oficiale konfesas ke dekoj, centoj, aŭ miloj da sovetiaj esperantistoj estis murditaj en la tridekaj jaroj.

Literatura konkurso

La literatura konkurso Ivo Rotkvič 90 entenas la jenajn branĉojn:

1. Poezio

Originala poemo aŭ poemaro, longo nedefinita.

Tradukita poemo el unu el la naciaj lingvoj uzataj en Jugoslavio. Necesas aldoni la originalan tekston.

Premio: Mona

Tra la mondo

2. Etprozo

Rakonto, eseo, novelo, skizo, sceno, originale verkita en maksimuma longo de kvincent (500) vortoj, ne antaŭe publikigita en presa, radia aŭ televida formo.

Premio: Libro kaj mono

Konkursi povas ĉiu esperantisto. Necesas sendi tri kopiojn de la konkursa kontribuajo, provizita per pseŭdonimo, al:

Zagreba Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/1, Yu-41000 Zagreb.


En aparta fermita koverto estu indiko pri la plena persona nomo kaj adreso.

Limdato estas la 20-a de novembro 1990. Por lastlastuloj validos la poŝta stampo sur la koverto montranta tiun daton.

La premio-gajnintoj estos proklamitaj enkadre de la ĉi-jara zagreba Zamenhof-festo en decembro.

Novaj revuoj

La ilustrita revuo *Vjetnamio*, kiu ĝis nun aperis en naŭ lingvoj, la vjetnama, angla, franca, rusa, hispana, germana, laosa, kmera kaj ĉina komencis aperi ankaŭ en Esperanto. En Azerbaĝanio ekaperis *Sovetia Esperantisto*. Laŭ specimeno, ĝi



sajnas temi pli pri Azerbaĝanio ol pri la soveta esperanto-movado ĝenerale.

... kaj malnova

Heroldo de Esperanto festis sian sepdekjaran jubileon. Ĝi estis fondita la 14-an de aprilo en Horrem/Kolonjo, Germanio, de Teo Jung. Pro naziaj persekutoj ĝi devis translokiĝi al Nederlando.

Sub la redaktado de Ada Fighiera-Sikorska la gazeto nun aperas en Torino, Italio. La ĉefaj karakterizoj de tiu ĉi gazeto estas ĝia granda formato, simila al tag-gazeto, kaj la vario de ĝia enpagiĝo, ĝia ofteco (16 numeroj jare), la abundeco de ĝiaj informoj, verkitaj en sinteza stilo kaj prezentitaj en multaj rubrikaj junularo, kongresoj, feriaj, renkontiĝoj, libro-recenzoj, jubileoj, mallongaj informoj, Nia Filmo, anoncetoj ktp. plue la specialaj numeroj pri la Universalaj Kongresoj kaj la kalendaro de la Esperantaj kunvenoj kaj renkontiĝoj, kaj fine ĝia sendependeco

Broŝuro pri Bergen

Aperis kolora faldfolio pri Bergen en Norvegio, kie okazos venontjare la Universala kongreso de Esperanto. Vi povas peti "Bergen - enirejo al la fjordaro" ĉe: Bergen Reiselivslag, Slottsgaten 1, N-5003 Bergen, Norvegio

Progreso en Pakistano

Prosperas la esperanto-agado en Pakistano. Pakistana Esperanto-Asocio (PakEsA) aranĝis tritagan someran kunvenon. Parolis esperante eĉ malgrandaj infanoj. PakEsA komencis publikigi propran revuon kun la nomo "Esperanto".

La 23-a somera kurso en Jyväskylä

En Jyväskylä en meza Finnlando okazis esperanta kursemajno de la 1-a ĝis 6-a de julio 1990. Tia kurso okazis jam 23 fojojn kaj ĝi apartenas al la somera kursprogramo de la universitato. Tiun ĉi jaron la redaktoro Eva Farkas el Budapest estis nia sperta instruistino. Ni estis ĉirkaŭ 20 partoprenantoj, el kiuj ni tri svedoj kaj unu ĉeĥo kontribuis al la internacia atmosfero.

Ni estis dividitaj en unu grupon por komencantoj antaŭtagmeze kaj en alian por progresintoj posttagmeze. En la komencanta grupo Eva Farkas havis finlingvan "helpinstruiston", kiu je bezono klarigis komplikajn aferojn.

Por la progresintoj Eva havis elekton de interesaj diskutproblemoj (pri rilatoj inter generacioj, la situacio de maljunuloj, elekto de profesio ktp). Samtempe ni pridiskutis gramatikajojn.

La grupo de progresintoj antaŭtagmeze dediĉis sin al konversacio pri diversaj temoj sub la gvido de Terttu Tyynelä de la esperantoklubo de Jyväskylä.

En la vesperoj okazis diverstipaj distroj, ekz. interkona vespero, hungara kaj finna vesperoj. La marda vespero havis por ni eksterlandanoj grandan travivaĵon, ĉar tiam ni spertis vere finnajn kutimojn. Ĉiuj estis invititaj al somerdomo ĉe lago ekster la urbo. Tie ni uzis la saŭnon, kaffrinkis kaj rostis kolbasojn. Grupo de muzikantoj ludis por ni finnan popolmuzikon preskaŭ la tutan vesperon.

Gun: La plej memorinda evento de la semajno tamen estis por mi la vespera ŝipkrozado sur la granda lago Päijänne. La tutan tempon ni povis sidi sur la ferdeko, ĝuante la multkoloran sunsubiron kaj admirante la ĉirkaŭantan pejzaĝon. La kuirejo de la ŝipo ofertis bongustan manĝon al ĉiuj, kiuj deziris.

Kerstin: Estas malfacile elekti la plej memorindan eventon. Sed mi kun granda ĝojo memoras la "fuman saŭnon", kiun mi spertis dum la fina vespero. Ĉiuj, kiuj ĉestis, ricevis saŭnan diplomon por memoro.

Nils-Erik: Antaŭ monato Jyväskylä estis por mi nur ekzotika nomo

sur la mapo de nia orienta najbarlando, sed nun ĝi estas memorinda kaj revizitinda loko. Speciale mi memoras la lastan vesperon, kiam ĉiuj jam bone konis unu la alian kaj ĉiuj partoprenantoj prezentis programeron.

Gun: Kiam mi pense rerigardas la kursemajnon, mi alte taksas tri faktojn. La unua kompreneble estas, ke la aranĝintoj sukcesis havigi kompetentan instruiston. La dua estas, ke kaj dum la lecionoj kaj dum nia libera tempo regis amika kaj bonhumora atmosfero. La tria estas, ke la aranĝintoj donis al la partoprenantoj tiom da tempo por komuna kunestado. Tiel funkcias bone planita kurso! Pro tiuj kialoj mi vere ŝatas fari reklamon por la esperantokursoj en Jyväskylä. Iru tien kaj spertu mem!! Mi garantias, ke vi ne pentos tiun viziton en Finnlando.

Kerstin kaj Nils-Erik plene konsentas.

Gun Gerdman
Kerstin Kristoferson
Nils-Erik Kristoferson



*Somervespera
krozado sur la finna
lago Päijänne estis
unu neforgesebla
travivaĵo dum la
kursemajno en
Jyväskylä.*

La vera danĝero kontraŭ Esperanto

Lastatempe estas rimarkebla en la esperanta gazetaro pliintensiĝo de la "eterna kampanjo" de alarmitaj verdstelanoj kontraŭ la angla lingvo. Kelkaj naive provas demonstri, kial tiu granda kaj glora kulturlingvo ne konvenas kiel solvo de la monda lingva problemo, kaj erudiciuloj alportas ankaŭ fakajn donitaĵojn pri la gramatiko kaj fonetiko de la angla por reliefigi ĝiajn difektojn kaj malfacilan lerneblecojn. Tiaj argumentoj estas esence nerealecaj kaj malefikaj, ĉar ili baziĝas sur la erara supozo, ke la akcepto de tutmonda interkomunikilo por forigi lingvajn barilojn fare de politikaj potencoj kaj ekonomiaj interesoj, dependos de la lingvo mem.

Esperantistoj en la aktuala mondo devas elreviĝi; ne eblas venki la anglan lingvon - nek per racia rezonado nek per nigrigado. Tiuj, kiuj faras tion, tutsimple kraĉas en uraganon. Dum esperantistoj donkiĥoteske penas terenfaligi la neŝanceblan koloson, ĝi malice kovas venĝon por detruo Esperanton, ne per fronta atako sed en la formo de insida penetrado en la lingvon, nome per la lingva poluado.

Tralegado de nuntempaj tekstoj publikigitaj en gazetoj kaj libroj malkovras, ke ĉiam pli ofte troviĝas anglismoj kaj ankaŭ anglaj vortoj en diversspecaj verkoj. Respondecas pri tio ne nur verkistoj, kies denaska lingvo estas la angla, sed ankaŭ fremduloj, kiuj, lerninte kelkajn vortojn el la angla, volas orgoje paradigi siajn sciojn. Ili, do, lardas siajn skribaĵojn per anglaj vortoj same kiel antaŭe oni faris tion per latinaj kaj helenaj esprimoj.

Ekzemploj de poluita Esperanto

La sekvaj ekzemploj, cititaj el diversaj fontoj, ilustras la mensan aberacion de homoj, kiuj pensas angle kaj skribas esperante. Pro manko de spaco, mi prezentos nur unu ekzemplon de ĉiu tipo de trudado de la angla lingvo en Esperanton. Post

"Se la disvastiĝanta angla poluado en Esperanto ne estos baldaŭ haltigita, sojle de la tria jarcento la esperantistoj parolos la anglan lingvon!"

ĉiu citaĵo sekvas la nacieco de la aŭtoro.

1. *Uzo de anglaj vortoj interkrampe aŭ piednote por klarigi Esperantajn vortojn.*

"Devigis min tion fari mia sento pri justeco (fair play)..." (Anglo.)

2. *Uzo de esperantaj vortoj interkrampe aŭ piednote por klarigi anglajn vortojn.*

"Mi proponis la pricipon *wait and see* (atendi kaj vidi)." (Hungaro.)

3. *Uzo de angla vorto aŭ esprimo en esperanta teksto sen glosado, kvazaŭ la verkinto supozus, ke liaj legantoj ja scias la internacian anglan lingvon.*

"(La aŭtoro)... sur 92 malŝpare presitaj paĝetoj movigas siajn personojn *slow-motion* kvazaŭ en ligno-ŝuoj." (Dano.)

4. *Erara lingvouzo kaŭzita de t.n. falsa amiko.*

(Instrukcioj por kanto en lernoli-

bro por geknaboj:) "Dum la refreno ni klapu la manojn takte.." (Germano.)

5. *Uzo de anglalingva mallongigo.*

"Ono portis L.P.-diskon, kiun verŝajne li aĉetis survoje." (Japano.)

6. *Hibrida vorto formita per kunmeto de angla kaj esperanta morfemoj.*

"Multe da ili troviĝas en la futnotoj de la versio de la Biblio laŭ reĝo Jakobo." (Usonano.)

7. *Kreado de densigita vorto (valiz-vorto) laŭ la maniero de Lewis Carroll.*


"Sub la premo de sia propra gravito, la nebulo ŝrunkas." (Esperanta "ŝrumpi" + angla "shrink") (Israelano)

La ĉi-supraj ekzemploj atestas sen ombro de dubo, ke jam komenciĝis la Angla Periodo de la historio de Esperanto. Se la disvastiĝanta angla poluado en Esperanto ne estos baldaŭ haltigita, dum la dua jarcento de la lingvo evoluos nova internacia piĝino, *Esperglis*, sojle de la tria jarcento la esperantistoj parolos la anglan lingvon!

Tamen, se la samideanoj ne estas inklinaĵoj akcepti tiun morgan futurologian prognozon, ili devas ekagi tuj, senprokraste, sed nur pozitive. Unue, oni ĉesigu la nefruktodonan negativan propagandon kontraŭ la angla lingvo. Due, oni penadu purigi Esperanton per rigora eliminado de ĉiuspeca anglismo kaj angla esprimo kiel tiuj uzataj en la ĉi-supraj citaĵoj. Oni ne forgesu, ke nur pura, sana Esperanto kapablos ĝisvivi por esti komprenebla kaj uzebla, kiam venos la tago de la verda venko.

Bernard Golden

KRUCVORTENIGMO



Horizontale:

1. Biletotruigista
2. Vaz' - Plej bona part' de aro
3. Bele aranĝas - Sovetunio
4. Besteto en Aŭstralio - Muzik-kaj marŝritm'
5. Elektra unu' - Kolekto de arkoformaj akvoamasoj

6. Sinjorin' - Aŭguro, antaŭsigno
7. Kolekto de femaloj - Prepozicio: malekster
8. Oftan poŝtajon - Hispanio kaj Aŭstrio
9. Estas karaj gastoj longe
10. Gazon truigitan super Antarkto

Vertikale:

- A. Parolas nacilingve inter esperantistoj
- B. Malgranda literatura rakont'
- C. Senvesta - Evangelisto
- Ĉ. Borilo - Organ', urinfiltril'
- D. Fingropintaĵon - Aranĝo
- E. Sekve - Ripozej' en dezerto
- F. Dokumento pri heredo
- G. Konjugacio post komparativo - Ludej' - Membr'
- Ĝ. Malŝancon - Ĉambro
- H. Valorega ludkart' - Post sepa

Kompilis: Lennart Persson

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	O	R	I	O	N	O		P	O	R
2	K	O	N	D	U	K	T	O	R	O
3	E	S	T	O		O	E	R	O	J
4	T	E	R	E	N	O	T			O
5	T	I	R	A	N		F	A	R	
6	I	S		S	U	M	E	T	A	J
7	G		E		A		R	A	V	A
8	R	O	M	A	N	O				I
9	A	M	A	N	T		A	L	T	O
10	N	O	S	T	A	L	G	I	A	N

Solvo de la enigmo en La Espero 4/90

BERGEN 1991

Redan nu kan ni anmälare er till nästa års UEA-kongress i Bergen 27 juli-3 augusti 1991.

Kongressavgiften i svenska kronor:

	Till 1990-12-31	Till 1991-03-31	Från 1991-04-01
1. Direktmedlem i UEA (DM, MJ och MA)	585	730	875
2. Ej direktmedlem i UEA	730	875	1020
3. Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1991-01-01) som är direktmedlem i UEA	295	440	585
4. Medföljande, handikappad eller ungdom som själv inte är direktmedlem i UEA	440	585	730

Beställ anmälningsblankett hos **Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 HÖRBY**, tel: 0415/50 152. Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till **pg 14 74 29 - 5**, Esperantoförbundet, Specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser.

**Anna Eriksson,
Sundsvall**

Nia amikino Anna Eriksson forlasis nian maltrankvilan mondon. Ŝi suferis multe dum la lastaj jaroj pro malsano kaj akcidentoj. Per tio nia klubo Amika Rondo perdis unu el siaj plej entuziasmaj apogantoj. Ŝi estis membro dum multaj jaroj kaj estis esperantisto jam de ŝia juneco. Ŝi havis multajn leteramikojn tra la mondo kaj interalie ŝi vizitis la Universalan Kongreson en Ĉinio. Ni funebras multe, tamen memoros ŝin kun ĝojo.

Ingrid Näsholm

Aldonoj al la kalendaro en La Espero 1990:4

OKTOBRO

22 oktobro-19 decembro **Progresantkurso**, Karlskoga popola altlernejo (Karlskoga folkhögskola, Box 192, 691 24 Karlskoga)

NOVEMBRO

11 **Lingva seminario**, Kronetorpŝgatan 94, Malmö, gvidos Bertil Nilsson. (Ann-Christine Krondahl, Sjörupsvägen 102, Äsphult, 290 11 LINDERÖD)

JANUARO

7 januaro-8 marto **Komencantkurso**, Karlskoga popola altlernejo (adreso supre)

MARTO

18 marto-24 majo **Progresantkurso**, Karlskoga popola altlernejo (adreso supre)

JULIO

6-14 **Renkontiĝo Eŭropo-Azio '91**, Sverdlovsk, Sovet-Unio (SU-620077 Sverdlovsk, 77 ab. ja. 67, Urala esperantista societo, Sovet-Unio)
8-13 **Someraj kursoj**, Karlskoga popola altlernejo (adreso supre)

Pretigu por Kristnask' kun

Amplifiki

"Festoj de Kristnask'"

Tiel nomiĝas la sezonkasedo de Amplifiki. Ĉirkaŭ 20-minuta miksaĵo de tradiciaj kaj originalaj kantaĵoj, kun festado de Kristnasko kiel ĉefa temo. La muziko mem estas la kutima vario inter pli kaj malpli trankvilaj kaj maltrankvilaj ritmoj, inter meditado kaj dancado, inter ioma seriozeco kaj kompleta frenezec'.

La kasedo aperos en tre malgranda kvanto, nur 200 ekzempleroj, kaj tre verŝajne ne reeldoniĝos post elĉerpiĝo. Pro tio mendu nun vian propran ekzempleron. (Samtempe subtenu nian komunan kulturon.)

Enpagu **45 kronojn** al la poŝtĝira konto de Michael Englund: **55 11 17 - 6611**



Mendu **antaŭ la 15-a** de decembro, kaj vi havos la kasedon **antaŭ la 24-a!**

Mendu samtempe la antaŭan kasedon: **Esperanto ne konas landlimojn**. 40 minutoj, 70 kronoj.

Sten Svenonius

Erikstorpsgatan 26 A

21754 Malmö

Esperantoförbundet, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm

Tra la lando

La vortaro korektata

La nova sved-esperanta vortaro estas nun preta ĝis litero Ö. Tri kontrollegantoj faras la lastan kontrolon, ĉasante misskribojn kaj eventualajn aliajn eraretojn, kiuj daŭre restas.

La preta libro estos 512 paĝa, en formato A5, do pli granda ol la malnova vortaro. Ĝi aperos dum la unua duono de 1991.

Bonvenon al Gotenburgo 3-5 majo 1991

La jarkunsido de SEF en Karlskoga decidis, ke la venontjara kongreso okazu en Gotenburgo. La preparlaboro por tio komenciĝis. Ni nun povas sciigi, ke la kongreso okazos inter la 3a kaj 5a de majo 1991 en Hotelo Opalen. Kelkaj esperantistoj

eble memoras, ke ni havis la kongreson en la sama loko antaŭ kelkaj jaroj. Pli pri la kongreso vi povos legi en venontaj numeroj de *La Espero*.

Märtha Andreasson

El Siberio kaj Ĉinio

La klubon en Malmö vizitis en septembro grupo da esperantistoj, dancistoj kaj kantistoj el Tomsk, Siberio. La klubo organizis ekskurson kaj publikan koncerton.

Jam en julio granda aro da klubanoj kunvenis por aŭskulti prelegon de docento Liang Ziming, instruisto pri esperanto en la Universitato de Guangxi en suda Ĉinio. Li detale rakontis pri la stato de la esperanto-movado en Ĉinio.

(Cetere Klubo Esperantista de Malmö sendas sian revuon al la redaktanto de *La Espero*. Tial aperas raportoj pri ĝia agado.)

Lingva seminario

La suda distrikto de SEF invitas al lingva seminario en la klubejo en Malmö, Kronoporsgatan, la 11-an de novembro, 09.30-16.00. Ni tradukos, kaj diskutos gramatikajn kaj sèmantikajn problemojn. Gvidos Bertil Nilsson, Nyköping. Kotizo: 75 kronoj. Aliĝu plej malfrue la 2-an de novembro al: Ann-Christine Kron-dahl, Sjørupsvägen 102, Äspö, 290 11 LINDERÖD, 044-32 51 64.

Fariĝu delegito!

En Svedio ekzistas 113 delegitoj de Universala Esperanto-Asocio, sed pli multaj estas bezonataj.

Kiel delegito vi estas loka reprezentanto de UEA. Via tasko estas ekzemple dissendi novaĵojn el esperanto-revuoj kaj dissendi ilin al nacilingvaj gazetoj, aŭ alimaniere labori por esperanto. Por fariĝi delegito vi ankaŭ promesas respondi skribajn demandojn de esperantistoj en aliaj landoj.

Se vi volas fariĝi delegito, kontaktu la UEA-peranton: Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel 0414-50152.

Gunnar Gällmo denove premiita

Gunnar Gällmo denove ricevis premion en Belartaj Konkursoj de UEA, nome honoran mencion pro la poeziaĵo "Maja idilio". La juna hispano Georgo Kamaĉo cetere ricevis kvin premiojn en diversaj branĉoj. La sekretario Osmo Buller konstatis ke la ĉijara partopreno estis pli altkvalita ol en la antaŭa jaro.

Julklapp för gammal och ung

Kumeuaua, djungelns son

Skriven på esperanto av Tibor Sekelj, översatt till svenska. 68 sidor. Två sidor information om esperanto. Många bilder.

Pris: 52 kr. Beställ från EsperantoCentro, Esperantoförlaget eller direkt från Nordenstorm's förlag, Munkebergsgatan 38, 3 tr, 951 56 Luleå, tel 0920-279 78, postgiro 57 20 82-6.